# LA VOĈO DE AMIKEJO

TRIMONATA INFORMILO PRI ESPERANTO EN EUREGIO MOZO-REJNO


Senlime

**Groupe espérantiste de Verviers**

**Avec le soutien de la Fédération Wallonie-Bruxelles**


**En cas de non-distribution, merci de renvoyer à l'éditeur responsable:**
Jean-Marie **Jacques**,
5 rue Joseph Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informations en français**
**Informoj en la franca lingvo:**
Tel. +32-(0)87/33.02.92
Mail: jacques@senlime.org
Esperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**
**Informoj en la nederlanda:**
Tel. xx-31-(0)43-455.14.36
Mail: parren@senlime.org
P.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch**
**Informoj en la germana:**
Tel. xx-49-2406-7809
Mail: hogen@senlime.org
K. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH


**Aperas kvarfoje en jaro kaj rete elŝuteblas ĉe**
**www.senlime.org**


**Prezoj por BE, NL kaj DE :**
**Unuopa n-ro : 4 EUR**
**Jara abono : 12 EUR**

Abono al **papera** versio de nia informilo (12€) eblas sed **NE** en-havas la kotizon al ***Senlime*** (10 €).

Bonvolu pagi prefere antaŭ la jarfino **NUR** al la konto :
**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta) de ***Senlime***,
25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.


## ENHAVO :


**p. 1: UEA et Lille 2015**
**p. 2: Niaj programeroj lupee**
**p. 3: Eŭregiona kalendaro 2014-2015 (2/2)**
**p. 4: *Senlime* vous informe**


**Si vous souhaitez continuer à lire «La Voĉo de Amikejo» [La Voix d'Amikejo] veuillez vous abonner (12 EUR) ou le télécharger sur notre site internet (http://www.senlime.org/Info/Lasta.pdf)**
**(L'«Esperanto en Marche» NE paraissant plus).**

# Lille 2015

## 100e congrès universel d'espéranto

**26 juillet - 09-1 juillet 2015 août 2015**

L'Association Universelle d'Espéranto (*Universala Esperanto-Asocio*, ou UEA) a été créée en 1908 comme rassemblement d'espérantistes individuels. L'UEA est maintenant la plus importante association internationale consacrée à l'espéranto et a des membres dans 120 pays. Son siège social se trouve à Rotterdam, aux Pays-Bas, depuis plus de 60 ans. Pour soutenir son travail auprès des Nations-Unies et de l'UNESCO, l'UEA a également un bureau à New York, aux États-Unis.

Plus de 100 conférences et réunions internationales ont lieu chaque année en espéranto — sans traducteurs ni interprètes. Le plus important de ces événements est le congrès universel d'espéranto, organisé chaque année (sauf pendant les deux grandes guerres mondiales) sous les auspices de l'UEA. Le centième se tiendra au centre Euralille, avec comme thème officiel «Langues, arts et valeurs dans le dialogue interculturel».

Mais à côté des séances de travail de multiples activités, dont certaines bien plus festives, seront organisées. 3000 congressistes, dont une importante délégation verviétoise, y sont attendus.

# Niaj programeroj lupee

***detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,…***

## PEKo 2015 en Mozet

PEKo estas la nura plurtaga aranĝo nune regule okazanta en Valonujo. Ĝi taŭgas por ĉiuj: infanoj, junuloj, plenkreskuloj, komencantoj, spertuloj... Ĉi-jare la loko aparte taŭgis por infanoj: parko ĉirkaŭ kastelo kun interna korto, ĉirkaŭbaritejo por bestetoj...

Ĉijare la Verda Skoltoj ne nur partoprenis sed ankaŭ organizis PEKon kun Valer Doumont.

En la programo oni trovis diversnivelajn esperanto-kursojn, inter kiuj eĉ unua alproksimiĝo por veraj komencantoj.

Krome estis teatro, kino, atelieroj, prelegoj, manfarado, promenadoj, kaj ekskursoj. Inter la atelieroj funkciis metiista bierfarado (poste kompreneble sukcesis gustumado kaj vendado!). Filmis germana teamo de Arte-TV por la elsendo «Yourope» [Viaeŭropo] dum kiu la partoprenantoj kantis la Eŭropan himnon (filmeto provizore videbla sur la retejo de **Arte**).

Jean-Marie Jacques partoprenis kaj prezentos al vi sian (amatoran) filmeton pri la aranĝo.

Dum tiu unua kunveno de la nova lerneja (kaj kultura!) jaro, kiel kutime, trovos mallongan momenton nia tradicia «ĝenerala asembleo», al kiu ĉiuj membroj estas kore invititaj. Bonvenon al ĉiuj!

**09-18** 20h00 Kelmis, Select: raporto de J-M **Jacques** pri PEKo 2015 (+ filmeto kaj ĝeneralaj asembleoj de EGV kaj Senlime).

Inf. jacques@senlime.org

## Se la franca plenplenigas mian memoron, male esperanto ĝin malplenigas

*Texte en français page 6*

Se la franca lingvo plenplenigas mian memoron, male esperanto ĝin malplenigas.

Je la mezo de majo 2015 okazis la fina diktaĵo de Liliane **Balfroid**. Inter 430 gelernantoj nu du ĉampionis.

27 procentoj de la konkursantaro – aŭ 118 geknaboj – faris malpli ol ses erarojn.




Foto RTBF

Kio en esperanto? Tia konkurso estas vana ĉar la prononcataj vortoj estas sen enkaptaĵo(j). Normale iu ajn esperantisto devas skribi senerare.

Ek de multaj jaroj Raymond **Demarche** ne plu havas televid-aparaton. Li do multe legas. Tiam estos pri la prononco, la ortografio, la kompreno de francaj vortoj, kiujn li legis kaj notis, ke li al vi parolados. Komparante ilin evidente kun la esperanto-vortoj.

**10-16** 20h00 Kelmis, Select: "Se la franca lingvo plenplenigas mian memoron, male esperanto ĝin malplenigas", prelego de Raymond **Demarche**.

Inf. jacques@senlime.org

## Iu signifoklarigo de la genezo



*Ĉu demandi al la tri-taga infano?*

*Texte en français page 6*

Biblia citado kiu ne permesas, ŝajne, respondi.

Mia propono estas provi elmontri pri kio temas.

Sed por atingi mian celon, mi bezonos ek de la komenco interpreti la sciencan skemon ripetitan tri foje, en la genezo, subkonscie laŭ malsamaj formoj.

Tiu elmontrado farita, mi devos salti al aliaj komunaj punktoj, ekzemple la ardanta arbeto de Moseo aŭ ankoraŭ, eĉ, vidi pri kiu kruco Jesuo parolis kiam, parolante kun siaj disĉiploj, li asertis: Tiu kiu ne portos sian krucon kiel mi portas mian! Sed kian krucon li portis?

Mi min proponas gvidi vin tra imaga mondo, verdire modo. Kaj ne forgesu ke sen imagpovo vi estus nenio!

Kiel mi supozas, vi estas surprizota.

Charles Etienne Jean **Norga**

**11-20** 20h00 BE-Kelmis, Select: "Ĉu demandi al la 3-taga infano?", prelego de Charles **Norga** pri lia signifoklarigo de la genezo.

Inf. norga@senlime.org

# ESPERANTO✪

## Eŭregiona kalendaro 2014-2015 (2/2)

***Senlime*** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

«Trilandaj renkontiĝoj» estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de ***Senlime***. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).
La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de ***Senlime*** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kultur-centro "Select", Lutticherstr. 264.

**Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro:**

**Jean-Marie Jacques (jacques@senlime.org).**

**07-17 Somera paŭzo** (ni ne kunvenos).

**07-25** (→ **08.01 Universala Kongreso en Lille**).

**08-21 Somera paŭzo** (ni ne kunvenos).

**09-03** 09h30 Verviers, Les Minières, pl. Général Jacques: rekomenco de la **kursoj** por pliaĝuloj (>50 jaroj) kunlabore kun Eneo (aliĝo deviga).
Inf. jacques@senlime.org

**09-22** 15h00 Verviers, Les Minières, pl. Géneral Jacques: unua «**esperanto-kafejo**» por pliaĝuloj (>50 jaroj) kunlabore kun Eneo (aliĝo deviga).
Inf. jacques@senlime.org

**09-18** 20h00 Kelmis, Select: raporto de J-M **Jacques** pri **PEKo 2015** (+ filmeto kaj ĝeneralaj asembleoj de EGV kaj Senlime).
Inf. jacques@senlime.org

**10-16** 20h00 Kelmis, Select: "Se la franca lingvo plen-plenigas mian memoron, male esperanto ĝin malplenigas", **prelego** de R. **Demarche**.
Inf. jacques@senlime.org

**11-20** 20h00 Kelmis, Select: "Ĉu demandi al la tri-taga infano?", prelego de Charles **Norga** pri lia **signifoklarigo** de la genezo.
Inf. norga@senlime.org

**12-13** 12h00 **Zamenhof-festo** de «La Konko» en Oostendo, Ooststraat 29.
Inf. flory2@witdoeckt.be

**17-07 Pause d'été** (nous ne nous réunirons pas).

**25-07** (→ **08.01 Congrès Universel à Lille**).

**21-08 Pause d'été** (nous ne nous réunirons pas).

**03-09** 09h30 Verviers, Les Minières, pl. Général Jacques: reprise des **cours** pour aînés (>50 ans) en collaboration avec Eneo (inscription obligatoire).
Inf. jacques@senlime.org

**09-22** 15h00 Verviers, Les Minières, pl. G-al Jacques: 1er «**café-esperanto**» pour aînés (>50 ans) en collaboration avec Eneo (affiliation obligatoire).
Inf. jacques@senlime.org

**18-09** 20h00 Kelmis, Select: rapport de J-M **Jacques** sur **PEKo 2015** (+ video et ass. générales du groupe de Verviers et de Senlime).
Inf. jacques@senlime.org

**16-10** 20h00 Kelmis, Select: "Si le français bourre ma mémoire, l'espéranto, au contraire, la soulage", **conférence** de R. **Demarche**.
Inf. jacques@senlime.org

**11-20** 20h00 Kelmis, Select: "Demander à l'enfant de trois jours", une **interprétation** de la genèse par Charles **Norga**.
Inf. norga@senlime.org

**13-12** 12h00 **Fête Zamenhof** de «La Konko» à Oostende, Ooststraat 29.
Inf. flory2@witdoeckt.be

# **V**erviersa **A**ngulo

## **V**erviersa **E**speranto **G**rupo

*Kelmis-Amikejo, Verviers, Eurégion Meuse-Rhin,...*

# *Senlime* vous informe !

**Comité de V.E.G.:**

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79
Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30
Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

**Assoc. pour l'Espéranto (A.P.E.):**
www.esperanto-wallonie.be
Paul Kerris, secrétaire
103 rue Windt
4850 PLOMBIERES
Tél. 087/39.85.70
paulkerris@skynet.be

## Cotisations

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte

**BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque: Argenta)

de ***Senlime***, 25 rue Pierre Fluche, 4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information ne sera plus intégré à la revue de APE «Espéranto en marche», qui a choisi de ne plus s'éditer sur papier.*

*La cotisation pour **Senlime** reste fixée à **10 Euros** (ou 22 Euros si vous voulez un abonnement à cette revue sur papier).*

**Indiquez les nom, prénoms et domicile du membre cotisant:**
***«cotisation de.... pour....».***

**Skotlando lernu la Ĉinan !**

En Oktobro 2014 la skota registaro enkondukis en naŭ elementaj lernejoj en la ĉirkaŭaĵo de Edinburgo novan programon por plibonigi la lernadon de lingvoj. Dum ĉi tiu lernojaro kvinjaraj infanoj de 22 klasoj en tiuj lernejoj ricevos instruadon en la ĉina de ĉinaj studentoj de la Edinburga Universitato.

Ĉiuj studentoj jam ricevis mallongan instruadon pri metodoj por instrui la infanojn uzante ludojn kaj kantojn kaj tiel plu por enkonduki la sonojn kaj vortojn de la klasika mandarena lingvo al la junaj lernantoj.

La oficialaj konkludoj pri la eksperimento aperos ĉe la fino de la lernojaro, sed laŭ la opinioj de la lernejestroj la provizoraj rezultoj ŝajnas esti ege pozitivaj. La infanoj ĝuas la instruadon kaj la fremdlandaj studentoj profitas de la ŝanco havi pli da kontakto ne nur kun infanoj sed ankaŭ kun iliaj instruistoj kaj gepatroj.

La konsilistoj de la registaro esperas ke tia instruado veku la intereson de la infanoj por fremdaj kulturoj kaj lingvoj. Ili postulas ke infanoj sufiĉe frue komencu tian lernadon por eviti la kutiman reagon de multaj britaj junuloj al fremdlingvoj. Adoleskantoj en Britio ofte opinias ke la angla estas tiel disvastiĝinta ke ili tute ne bezonas lerni iun ajn alian lingvon.

Ne nur en Skotlando sed ankaŭ en Londono mem, la registaro agnoskas ke la instruado de fremdlingvoj en Britio estas reformenda, ĉar laŭ konkludoj de nova raporto pri modernaj fremdlingvoj en britaj lernejoj, nur 9% de dekkvinjaraj lernantoj estas kompetentaj en iu ajn fremdlingvo kompare kun 42% en 14 aliaj eŭropaj landoj. Eĉ la nombro de lernantoj kiuj interesiĝas pri la franca, la plej ŝatata fremdlingvo en Anglujo, daŭre malkreskas.

Grupo de spertuloj el ĉiuj partioj en la parlamento atestas ke Britujo perdas ĉiun jaron bilionojn da pundoj pro manko de lingvo-spertuloj ĉe eksporta komercado. Ili substrekis la neceson subteni "nacian resaniĝon" en la kampo de modernaj fremdlingvoj.

Pro la longdaŭra neglektemo kaj malestimo de fremdlingvoj flanke de la plejparto de britoj inkluzive de multaj politikistoj, ĉi tiu tasko certe estos ege malfacila.

Kiam duagrada altnivela lernejo en Oksfordo proponis al la lernantoj ke ili lernu la ĉinan, nur unu knabino interesiĝis! Ŝajnas ke ŝiaj gekunuloj (gekamaradoj) ne pretas preni sur sin la taskon lerni malfacilan orientan fremdlingvon.

Tion mi bone komprenas, ĉar antaŭ multaj jaroj mi klopodis lerni la ĉinan kaj atingis nur tre malkontentigajn rezultojn.

Tiutempe mi ankaŭ instruis la anglan al ĉinaj studentoj kaj devis konstati ke ili havis similajn problemojn kun mia lingvo.

Kompreneble mi nuntempe havas rimedon kontraŭ tiaj malfacilaĵoj. Oni bezonas pontlingvon. Sed kiel streĉa tasko estas konvinki aliajn pri tiu solvo: Lernu Esperanton!

Sheila **Spielhofer** (Aŭstrio)

– – –

## Komprenu «La Krizon»!

Iam dum malagrabla tago en malseka Irlanda vilaĝo – frapas pluvego kaj dezertas la stratoj.
La epoko estas malfacila, la lando ŝuldiĝis kaj ĉiuj kredite vivas.
Alvenas riĉa germana turisto: li haltigas sian luksan aŭtomobilon antaŭ la sola hotelo de la urbo kaj eniras. Li metas bileton da 100 EUR sur la akcepto-tablon kaj petas vidi la disponeblajn ĉambrojn cele elekti iun por tranokti. Por 200 EUR, la gastejestro donas al li ĉiujn ŝlosilojn kaj diras al li ke li elektu tiun kiun li plej ŝatos.

Tuj post kiam la turisto malaperis en la ŝtuparon, la hotelestro prenas la biletojn kaj eliras al la apuda viandisto por pagi al li ŝuldon sian.
La viandisto tuj iras al la porka bredisto al kiu li precize ŝuldas 200 EUR kiujn li tuj repagas.
La bredisto, siavice, tuj pagas sian fakturon al la agrokultura kooperativo kie li aĉetas nutraĵojn por la brutaro.
La kooperativa direktoro rapidas al la trinkejo por nuligi sian saldon.
La trinkejestro ŝovas la du biletojn al la prostituitino kiu jam de longe servas al li.
La ino, kiu kredite okupas kun siaj klientoj ĉambrojn en la hotelo, tuj pagas sian ŝuldon al la gastejestro kiu metas la 200 EUR sur la akcepto-tablon, tien, kien la germana turisto ilin antaŭe metis.
Tiu lasta malsupreniras la ŝtuparon, anoncas ke li trovis nenian plaĉan ĉambron, reprenas siajn biletojn kaj foriras.

Neniu ion ajn gajnis sed la nombro da ŝuldantoj malkreskis kaj la estonto ŝajnas pli promesplena.
Tiel funkcias la sav-planoj profite de la Eŭropaj ŝtatoj en malfacila situacio! Vere ne necesas diplomitiĝi en universitato por kompreni la sistemon!

## En latin, anglais, français... ou espéranto...?

Ce mercredi 25 février, les élèves [de l'Athénée de...[1]] de l'option latine ont eu la joie de participer à une nouvelle activité (***Quaestiones Naturales***) organisée par l'ACFLA (Association de la Communauté Française pour les Langues Anciennes) au musée de la médecine à l'ULB (Université Libre de Bruxelles).

Chaque école devait présenter aux autres groupes une réalisation personnelle et originale qui établissait une comparaison entre médecine antique et moderne. L'Athénée a opté pour une approche humoristique sous forme de ***sketch*** intitulé ***«Help me doctor»***, ciblée sur la consultation médicale à travers les différentes époques et agrémentée d'un ***powerpoint***. Ce travail a fait l'objet d'une préparation de recherche historique et de plusieurs répétitions. L'exposé finissait par un ***quiz*** qui a été particulièrement apprécié par les autres écoles.

[...] Une fois de plus, force est de constater à quel point **le latin**[2] est présent dans notre société et comment il s'inscrit comme le parfait partenaire de très nombreuses disciplines (les sciences, l'histoire, le français, l'expression théâtrale...).

La Quinzaine VERVIERS–18/03/2015

***Notes de la rédaction:***
(1) nous cachons intentionnellement l'identité de l'école mais quasi-toutes sont «au diapason» !
(2) si l'espéranto a emprunté (lui aussi!) son vocabulaire en partie au latin, sa grammaire est infiniment moins complexe et son étude demande dix fois moins de temps qu'une autre langue moderne!

– – –

## Interview d'un «Verda Skolto»

*1) Bonjour. Qui es-tu ? De quel pays ou région viens-tu ?*
Je suis Delfeno ! *[Dauphin en espéranto].* Mais en dehors des scouts, je m'appelle Pjotr. J'ai 16 ans. J'habite à Anvers, et ma langue principale est le néerlandais. *[Pjotr parle aussi le russe]*
*2) Quand as-tu commencé à venir aux Verdaj Skoltoj ?*
Depuis déjà plus de deux ans, je suis un verda skolto, un "scout vert". Donc j'ai commencé quand j'avais 14 ans.
*3) Est-ce que les langues ont été un problème ?*
Non, je parlais déjà couramment l'espéranto. Et je pouvais utiliser le français avec ceux qui ne connaissaient pas encore suffisamment l'espéranto.
*4) Qu'aimes-tu chez les scouts ?*
Mes camarades scouts !!
*4) Chez les Verdaj Skoltoj, les scouts viennent de différentes régions, de différents pays (Flandre, Bruxelles, Wallonie, Luxembourg, France, Allemagne, Espagne, Suisse). Les autres parlent d'autres langues, ont d'autres coutumes… N'y a-t-il jamais de problème ? d'incompréhension ? Raconte-nous !*
Il y a des malentendus, mais cela ne pose pas de problème. C'est parfois très amusant.
*5) Les scouts se débrouillent et vivent des aventures. Raconte-nous une aventure belle, intéressante ou mémorable que tu as vécu chez les scouts !*
Durant le camp d'été en 2013 nous avons fait du kayak. Il faisait beau, suffisamment chaud. Donc Dingo, Korakso et moi n'avions pas peur de tomber à l'eau en nous mettant debout sur les kayaks instables. Évidement, nous sommes tombés. Mais nous avons été surpris de ne pas sécher rapidement. Dingo fit la réflexion quelques heures après : "Je me sens encore vraiment mouillé", à quoi Lupo *[Loup]* a

répondu “Oui, en fait en Belgique l’eau est mouillée !” C’était peut-être un malentendu culturel… *[note : Dingo est français et Lupo, wallon]*

*6) Comment dit-on “au revoir” dans tes langues ?*

“Tot ziens”, mais plus utilisé: “Daaaaaag!”

“до сведания”, ou plus utilisé “пока пока”

*Daaaaag! Delfeno, et à bientôt!*

*Valère Doumont*

**Scouter autrement !**

http://verdajskoltoj.wordpress.com

_ _ _

**Si le français bourre ma mémoire, l'espéranto, au contraire, la soulage.**

A la mi-mai 2015 eut lieu la dictée finale de Liliane **Balfroid**. Sur 430 élèves il y eut deux zéro faute. 27% des concurrents – soit 118 enfants – ont commis moins de six fautes.

Et en Espéranto? Un tel concours est inutile puisque les mots prononcés sont sans piège. Normalement tout espérantiste doit réaliser un sans faute.

Depuis des années, Raymond **Demarche** n'a plus de téléviseur. Il lit donc beaucoup. Et c'est à propos de la prononciation, de l'orthographe, de la compréhension de mots français, qu'il lut et nota, qu'il vous entretiendra. En les comparant, bien sûr, avec les mots espérantistes.

**Demander à l'enfant de trois jours** (une interprétation de la genèse)**?**

Citation biblique ne permettant, semble t-il, pas d'apporter une réponse.

Mon propos est d'essayer de vous démontrer de quoi il est question.

Mais pour atteindre mon but il me faudra dès le départ interpréter le schémas scientifique répété par trois fois, dans le genèse, sous des formes diverses. Cette démonstration faite il me faudra sauter vers d'autres points communs, par exemple voir le buisson ardent de Moïse ou encore "même" voir de quel croix Jésus parlait quand, discutant avec ces disciples, il affirmait: "Celui qui ne portera pas ma croix comme je la porte!" Mais quelle croix portait-il ?

Je me propose donc de vous emmener dans un monde imaginaire. Et n'oubliez pas que sans imagination vous n’êtes rien! Comme je le suppose vous serez surpris.

Charles Etienne Jean **Norga**

_ _ _

**Reprise des cours pour Eneo**

Comme l'an passé, un cours se donnera – pour les membres d'Enéo âgés de plus de 50 ans – dans la salle de la bibliothèque des Minières, Place du général Jacques, 5 à Verviers (à moins de 10 minutes à pied de la gare) les jeudis de 9h30 à 11h30 (sauf congés scolaires) à partir du 3 septembre 2015.

Après une longue introduction (que les vrais débutants ne doivent pas manquer), nous aborderons (début novembre) l'étude de la langue avec le livre «Gerda malaperis», un roman policier pédagogique permettant d'étudier l’espéranto facilement, agréablement et efficacement.

Il est nécessaire d'être membre d’Évasion (ou d'un autre club local dépendant d'Enéo) pour participer et l'inscription préalable est obligatoire. Le coût est de 2 EUR par heure de cours, à charge des participants. L'affiliation à Évasion coûte 12 EUR par an mais celle-ci pourra, sous certaines conditions (minimum de 80% de présences et de 50% à l'examen), vous être remboursée en fin d'année par le groupe espérantiste de Verviers.

Rens. & inscr.: 087/33.02.92.

**«Café-esperanto» à Verviers**

Après un an de cours d'espéranto chez Eneo, les anciens élèves connaissent la grammaire et le vocabulaire de base de la langue. A l'aide d'un dictionnaire, ils savent lire et écrire. La compréhension à l'audition, et surtout la prise de parole en espéranto peuvent encore être améliorées.

Pour ce faire, Évasion proposera aux anciens élèves et espérantistes intéressés, en 2015-2016, les 4e mardis du mois de 15h à 17h (dates à confirmer, selon la disponibilité ou non du local) des activités diverses en espéranto: informations, conférences, débats, jeux, karaokés, théâtre (sketches), cinéma,... et même visites guidées et autres "sorties": tout ce qui pouvait ou pourrait se faire dans (ou au départ d')un café-centre culturel, mais EN ESPERANTO: "Estas malpermesite krokodili!" (il est interdit de parler sans nécessité dans sa langue maternelle)...

Même lieu (local de la bibliothèque des Minières, place du Général Jacques à VERVIERS), même conditions financières que les cours (être membre d'Eneo + 4 EURos par séance).

Attention: ce '"café"' sera une "auberge espagnole": les participants seront invités à apporter leurs idées, leurs propositions (leur matériel et leurs boissons, le cas échéant). Évasion assurera la participation d'un animateur (informateur, coordinateur, facilitateur, conseiller,... et non professeur: les débutants doivent d'abord participer aux cours du jeudi matin).

Renseignements et inscription préalable (obligatoire) chez

Jean-Marie **Jacques**
087/33.02.92.